ORIENTA STELO

Novembro 2014

NUMBER 297 NUMERO

Orienta Esperantista Federacio — Eastern Esperanto Federation
Originale fondita en aprilo 1932 — Originally founded in April 1932

Kontaktdetaloj

Roy Threadgold	Prezidanto	01371850481	roy@boydellsdairy.co.uk.
Roy Simmons	Sekretario	01473461346	rokeby@globalnet.co.uk
Barrie Murphy	Kasisto	01702472193	celiaandbarrie@tiscali.co.uk
Mark Drake	Komitatano	02085188094	marko.drejko@gmail.com

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

.....

La 24an de majo dekduo da anoj kunvenis ĉe Whitton Baptist Church

La ludoj, diskutoj, disputoj kaj manĝ/trinkado okazis kiel kutime, sed malpli kutima estis la kuktranĉado por festi la cent dek (se mi memoras ĵuste) jarojn de la Orientlondona Grupo.
Roy S. estis preparinta surekranan cerbostreĉan kvizon kiun estris Roy T.
La promeno sub la maja suno sekvis vojetojn laŭ la rivero Ĝiping (Gipping). Tuj post la promeno ekpluvis! Ĉu oni benis nian kunvenon?

Ho ve! La mezsomera pikniko en aŭgusto estis tute malsama. Via prezidanto kaj sekretario (kaj iomete poste, la kasisto) alvenis por bonvenigi la homamason - kiu konsistis el du neesperantistaj scivolemuloj – patro kaj filino.
La patro ekigis la konversacion per la vortoj: "*Mia kusenveturilo estas plena je angiloj*". Nek Roy

nek Roy komprenis la signifon de tiu frazo, kaj dum pluraj minutoj konfuzo reĝis. Ŝajne oni devas scii iom pri Monty Python antaŭ ol uzi tiujn vortojn. Permesu al mi klarigi la sencon per la samaj vortoj tradukitaj en Tok Pisin: *Balus em i no goupim bilong me em i pullup long liklik pela snek bilong solwarra.* Simple ĉu? Nun vi perfekte komprenas ĉion.

Kristnaska Kunveno

Braintree, St Michael's Church House

Sabaton la 29a de novembro

1100 ĝis 1700

Tagmono £5

Ludoj, prelego, baznivela gramatik-instruado, babilado ktp.
Ĉiuj bonvenaj, el kiu ajn lingvo-nivelo.

Christmas Gathering

St Michael's Church House, Braintree

Saturday 29th November

1100-1700

Day money £4

Games, talk, basic level grammar instruction, chat etc.
All welcome, whatever your language level.

Kimie atentigas nin pri la **Mediteranea Esperanta Semajno** kiu okazos 7-an ĝis 14-a de marto de 2015 en St Raphael, Sudfrancio. Jen bonega ŝanco eskapi la britan veteron.
Trovu la detalojn ĉe:
http://www.esperanto-provence.org/IMG/pdf/MES_2015_Esperanto_aligilo.pdf